# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu “esperanto grupo bilbao”

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**APRILO/JUNIO 2022** **Nro. 131 (2/22)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 10 de junio, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:
1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2021.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2022.
4. Renovación de la Junta Directiva.
5. Cambio de firmas en la cuenta del Grupo.
6. Informaciones varias.
7. Ruegos y preguntas.

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas hispane legi ĉi-supre, la **vendredon 10-an de junio, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon.

**TAGORDO**:
1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno.
2. Same pri la spezoj de la jaro 2021.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2022.
4. Renovigo de la estraro.
5. Ŝanĝo de subskribantoj ĉe Kutxabank.
6. Diversaj sciigoj.
7. Proponoj kaj sugestoj.

**LOKE ...**

## Hispana Kongreso en Comillas (Kantabrio).



Membroj de la E-Grupo de Bilbao en la kongresejo. De maldekstre dekstren kaj de supre malsupren: David, Igone, Jesús, Susana, Odei, Diego, Edorta kaj Paco. Sur la foto mankas Octavio.




La belega kongresejo.

Kaj pli da kongresantoj



**LOKE ...**

## La busto de Zamenhof.



Tiu ĉi busto troviĝas en la sidejo de la E-Grupo de Bilbao de antaŭ multe da jaroj. Ene de ĝi aperas la subskribo “Lucarini”, kiu estas la familnomo de tre famaj artistoj de Bilbao, pentristoj kaj skulptistoj. Tio ofte vekigis nian scivolemon pri la aŭtoro, eĉ pri la valoro de tiu verko.

La aŭtoro estis Liberto Lucarini Macazaga, kiu naskiĝis en Vitorio en 1910. Pro la laboroj de la patro, itala skulptisto, li loĝis jen en Bilbao, jen en Vitorio. Same kiel siaj fratoj, li eniris en 1921, 11-jaraĝa, en la Lernejo pri Artoj kaj Metioj de Atxuri (pr. Aĉuri) en Bilbao, kie li estis elstara lernanto.

Li propagandis kaj disvastigis Esperanton. Ankaŭ li apartenis al la Montarema Grupo “Esperanto”, kreita ene de la E-Grupo de Bilbao kaj, ene de ĝi, partoprenis la konkurson de la “100 montoj” (supreniri la 100 pli altajn montojn de Vaskujo) en 1928.

Samtempe, li laboris en la ateliero de sia patro kaj liaj politikaj priokupoj kondukis lin al la estraro de la liberecana junularo de Vaskujo, partoprenante, kune kun lia patro en la disvastigo de Esperanto. Dum la hispana intercivitana milito, tiel ke multaj gvidantoj de tiu organizo foriris al milito, li estis nomumita ĝia prezidanto. Iom poste, li iros al la milito kiel serĝento de milicanoj.

Liberto batalis en la militfronto de la bizkaja vilaĝo Otxandiano (pr. Oĉandiano) kaj fariĝis membro de la nordhispana komisiono por propagando de CNT, anarkiisma hispana sindikato.

Post la milito li devis ekziliĝi en Parizon, kie edziĝis al María Luisa Alcalde. Tie, li kunlaboris en la revuo “Solidaridad Obrera” (“Laborista Solidareco”), organo de tiu sindikato CNT, sub la pseŭdonimo Liberto Luzaga.

En Parizo, por sin vivteni li starigis atelieron por tajlado kaj polikromio. Fakte lia fako estis tajlado de ligno. Dum la hispana milito perdiĝis la plejparto de liaj verkoj, sed ne la busto de Zamenhof, kiu ankoraŭ troviĝas en la E-Grupo de Bilbao.

Post la morto de la diktatoro Franco (pr. Franko) li ree vizitis Hispanion, sed lia vivo estis jam enkondukita en Parizo, kien li reiris kaj kie fine mortis.



Liberto Lucarini kaj lia fratino. Hendaye (Francio), 1960.

**LOKE ...**

## Renkontiĝo de eŭskaj esperantistoj.




La printempa renkontiĝo 2022 de eŭskaj esperantistoj estos en **Orduña** (pr. Ordunja), 40 km. sude de Bilbao, la **sabaton 11an de junio**, laŭ la jena provizora programo:

-11:00 h. Rendevuo ĉe la granda parkejo de Orduña. Temas pri parkejo por domaŭtomobiloj kaj normalaj aŭtomobiloj. Ĉiam estas liberaj lokoj.
-11:30 h. Kafumado ĉe la ĉefplaco, en hotelo "Balneario".
-12:00 h. Turisma vizito: historia centro, remparoj, etnografia muzeo, ktp.



-14:30 h. Pikniko en "Área recreativa de La Muera", kiu lokiĝas en Arbieto, du kilometrojn for de la urbocentro. Ni veturos aŭtomobile. Se prognozo pri vetero estus malkonvena, ni tagmanĝus en restoracio.
- Post la tagmanĝo, piedekskurseto al la lageto "La Sima". Entute, 1,5 km.
- Fino: teumado en la restoracio "El Infierno", en la vilaĝo Delika, proksime al la naskiĝo de la rivero "Nervión", la sama kiu trairas Bilbaon.

## Plia E-objekto trovita de niaj membroj.




La pasintan someron, dum somerumado en "Cabo de Gata" (Almería), unu el la membroj de la Grupo de Bilbao troviĝis antaŭ la afiŝo, kiu videblas sur la apuda foto.

Li alproksimiĝis kaj demandis al knabino, kiu starigis tiun ejon por masaĝoj. Ŝi diris ke ne estas E-parolantino. Simple ŝi iam ie vidis la vorton kaj ĝi plaĉis al ŝi.

La ligna dometo troviĝas en la plaĝo de la urbeto San José.


## Kaj alia Esperantaĵo.




Kaj jen alia "Esperantaĵo". Ĝi estis kaptita en la urbo Santander kaj temas pri vendejo, kiu troviĝas ene de antaŭa urba merkato, kiu transformiĝis al loko kun multe da vendejoj kaj trinkejoj.

**H.E.F.**

## Universitata libro pri la hispana esperantista movado.




La profesoro pri Sociologio en la Universitato Carlos III de Madrido, Roberto Garvía, aŭtoro de *"Esperanto and its rivals"*, ĵus publikigis novan hispanlingvan verkon, kun titolo *"Lingvo kaj Utopio"*, pri la historio de la hispana esperantista movado inter 1890 kaj la komenco de la hispana milito en 1936 ("Lengua y utopía, el movimiento esperantista en España [1890-1936]").

La verko, akademie tre rigora kaj samtempe facile legebla, priskribas la grandegan diversecon de la esperantista movado, inklude de la interbataloj ene de ĝi kaj ankaŭ la kunlaboro eĉ en momentoj de alta socio konfliktado. Tiu pluraleco kaj toleremo ebligis surprizan renaskiĝon post la milito, kaj la kreadon de Hispana Esperanto-Federacio en momento kiam maloftis la sociaj movadoj grupigantaj homojn el ambaŭ flankoj kiuj nur antaŭnelonge luktis en la batalkampoj.

La verko estis eldonita de la Universitato de Granado. Eblas koni pliajn detalojn, elŝuti la indekson kaj specimenon de la enhavo, kaj aĉeti la bitan version (atentu, ne elŝuteblan sed nur legeblan rete en la paĝo de la eldonejo) kaj la paperan

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 79. Marto 2022)*

## Milo da elŝutoj de la scienca lerneja kalendaro en Esperanto.

Kiel ni informis en pasinta numero, la scienca lerneja kalendaro 2022, lanĉita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), aldonis novan version en Esperanto. Ĝi troveblas en la adreso: https://digital.csic.es/handle/10261/256432, prezentante ĉiun tagon iun sciencan aŭ teknikan datrevenon.

La esperanta versio estis elŝutita jam pli ol mil fojojn, kio reprezentas la kvinan plej konsultatan version el la dek ekzistantaj, super ekz. la angla kaj franca versioj.

Ni ankaŭ memorigas ke la kalendaron akompanas Didaktika Gvidilo, por ke instruistoj povu ĝin utiligi en lernejoj, kaj ke ĝi estas sekvebla ĉiun tagon kun la koncerna datreveno.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 79. Marto 2022)*

## Esperanto en la Filologia Fakultato de Valencio.



Ni ĝojas anonci, ke nia lingvo havos lokon en la 6a Kultura Semajno organizita de la Filologia Fakultato de la Universitato de Valencio.
Tago: Lundo 4a de aprilo.
17h: Prelego pri Esperanto, fare de Raúl Salinas.
18h: Baza kurso de esperanto, fere de Dennis Keefe.

*(Grupo de Esperanto de Valencio. 31/03/2022)*

## H.E.F.

## Ukrainio-Poezio por la paco.



La pasintan marton okazis en Madrido 12-hora poezia maratono fare de la engaĝiĝintaj poet-grupoj “Poezio pri la kritika konscio”, “Voĉoj el la ekstremo”, “Strikfonduso” kaj aliaj por protesti pri la invado de Ukrainio fare de Rusio.

Ĉi-kuntekste nia samideano Miguel Fernández estis invitita partopreni kiel Esperanta voĉo kadre de la “poezio pri la kritika konscio” kaj li plej volonte akceptis.

Li havis la okazon deklami siajn poemojn en la hispana kaj, laŭ peto de la organizantoj, ankaŭ en Esperanto. Tio do elstarigis la “internan ideon” de Esperanto kaj signifis vere mirindan agnoskon de la esperanta poezio.

*(“Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. 31/03/2022)*

## Kurso en universitato de Katalunio .

Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) proponas senpagan kurson de Esperanto al la lernantoj de la Universitato Pompeu Fabra.

La klasoj komenciĝos en majo, kaj okazos lunde kaj merkrede. Krome, oni ricevas universitatajn kreditojn ECTS. Pliajn informojn ricevu en la sociaj retoj de KEJ.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 80. Aprilo 2022)*

## Sukcesa kongreso en Komijas (“Comillas”).



Inter la 29a de aprilo ka la 3a de majo disvolviĝis la 80a Hispana Kongreso, 3 jarojn post la antaua, okazinta en Malago en la jaro 2019. Pandemio malebligis la kongreson en majo 2020, kiam ĉio estis jam preta. Poste, en 2021, daŭrigis pandemio, kio trudis la okazigon de kongreso virtuale. Kaj fine, en 2022, eblis denove fizike renkonti samideanojn.

Comillas estas belega urbeto kun amaso de vizitindaj monumentoj, inter ili la kongresejo mem. 150 homoj aliĝis al la kongreso, multaj jam en la jaro 2020. Pro specialaj cirkonstancoj de pandemio kaj posta milito, mankis multe da eksterlandanoj. Feliĉe, eblis kunigi ĉirkaŭ 100 homojn, kiuj iom kolorigis la urbon dum la promenadoj kun verdaj sakoj.

## Hispana kongreso por la jaro 2023.

Dum la ĝenerala kunsido de HEF en Comillas, inter aliaj aferoj, la estraro informis pri la kontaktoj starigitaj kun la esperantistoj de la urbo Sevilo (Sevilla) cele al organizado de la venontjara kongreso.

# TRA LA MONDO …

## TEJO ree malaprobis genran kvoton.

Jam la duan fojon dum ses monatoj la komitato de TEJO voĉdonis kontraŭ propono laŭ kiu almenaŭ triono de la kandidatoj por ĉiuj postenoj estu de malsamaj genroj. La komitato krome elektis du novajn estraranojn por anstataŭigi eksigitojn.

La 24-an de novembro 2021, la komitato voĉdonis kontraŭ la propono por kvotoj laŭ genro kaj loĝkontinento. 5 voĉdonis jese, 14 nee kaj 6 sindetene. La komisiono de egaleco poste reproponis la amendon kun kelkaj malgrandaj ŝanĝoj, sed ne klarigis kial oni atendis, ke la rezulto estos malsama la duan fojon. La plej granda ŝanĝo estis ke nun la komitato voĉdonis pri ĉiu el la 14 punktoj unuope anstataŭ kune.

La propono ne postulis kvotojn por la estraro kaj aliaj postenoj, nur por la kandidatoj. Oni juĝus la diversecon de kandidataro entute, ne por ĉiu unuopa posteno, ĉar por iuj postenoj, kiel tiuj de prezidanto kaj kasisto, kutime estas nur unu kandidato. Krome ne estus senlima remalfermado de la alvokoj – oni farus nur unu novan alvokon pri kandidatoj, se la unuan fojon la kvoto ne estus atingita.

*(“Libera Folio”. 18/04/2022)*

## TEJO ricevas 25 000 eŭrojn por muzikalo.

TEJO ricevas subvencion de 25.000 eŭroj por fari muzikalon en Esperanto. Ĝi estos prezentita dum la Internacia Junulara Kongreso en Nederlando en aŭgusto. La muzikalo temos pri iu fikcia IJK, kaj TEJO serĉas kandidatojn por la roloj.




La preciza sumo de la subvencio estas 24 975 eŭroj, kaj ĝi venas de Erasmus+ kadre de la programo KA152. Laŭ la retejo de Erasmus+, la programo celas “subteni organizojn kaj grupojn de junuloj por fari junularajn interŝanĝojn, por kunigi junulojn el malsamaj landoj por interŝanĝi kaj lerni ekster la formala edukada sistemo.”

Kvin aliaj asocioj helpos realigi la projekton. Ili estas Kataluna Esperanto-Junularo, Germana Esperanto-Junularo, Itala Esperanto-Federacio, EUROKKA kaj Pola Esperanto-Asocio.

*(“Libera Folio”. 04/05/2022)*

## TEJO denove rifuzis geografian kvoton.

Jam duan fojon la komitato de TEJO voĉdonis kontraŭ propono por geografia kvoto por ĉiuj kandidatoj al postenoj en la organizo. Laŭ kritikantoj la balotilo estis malneŭtrala kaj celis puŝi pli da komitatanoj subteni la proponon.

*(“Libera Folio”. 28/04/2022)*

## TRA LA MONDO …




Ankoraŭ ni ĉiuj ŝokitaj de la invado de Rusujo kontraŭ Ukrainujo, jen kelkaj novaĵoj aperintaj en "Libera Folio" pri tiu hontinda okazantaĵo.

## La prezidanto de Rusia E-Unio volas likvidi Ukrainujon.

Rusujo nepre ne intertraktu pri paco kun Ukrainujo, sed likvidu la nunan ŝtaton kaj komplete "rastu" ĝian tutan teritorion. Tion opinias la prezidanto de Rusia Esperanto-Unio, kiu argumentas ke Rusujo, male ol Ukrainujo, strebas "minimume damaĝi al normalaj homoj". "Bona kirurgo estas akurata kaj ne verŝas sangon pli ol tio necesas por la operacio", skribas Aleksandr Lebedev.

La gvidanto de Rusia Esperantista Unio, Aleksandr Lebedev, forte kontraŭas pacan traktadon inter Ukrainujo kaj Rusujo, opiniante, ke la rusia armeo devas "rasti" ("purigi") la tutan teritorion de la najbara lando. La gvidanto de REU ne la unuan fojon publike anoncas sian vidpunkton pri la milito. En la esperantista mondo plej diskoniĝis lia deklaro, en kiu li kiel "privata persono" plene subtenis la militon kontraŭ Ukrainujo.

*("Libera Folio". 05/04/2022)*

## Esperantistoj helpas defendi Odeson.

Viktor Vilĥa en Odeso kolektas subtenon por la defendo de sia hejmurbo, kaj li jam ricevis kontribuojn de esperantistoj el pluraj landoj. Sed mirigas lin, ke ekzistas ankaŭ esperantistoj, kiuj subtenas la invadon de aliaj landoj. "Tio estas por mi tute nekomprenebla afero", li diras.

Viktor Vilĥa kun ĵus liveritaj turniketoj por la defendantoj de Odeso. Turniketo estas ilo por premi arterion kaj interrompi grandan sangadon de korpoparto vundita aŭ eĉ perdita.

Viktor Vilĥa estas ukrainia esperantisto, kiu laboras distance pri librotenado kaj tial povas libere elekti sian loĝlokon. Li alterne loĝas en Lvivo kaj Odeso, printempe kutime en Lvivo por labori en la ĝardeno de sia patrino. Sed pro la milito li decidis resti en Odeso, kie li nun aktive partoprenas la volontulan movadon por helpi en la defendo de la urbo.

*("Libera Folio". 19/04/2022)*

Rilate al antaŭa novaĵo pri la sinteno de la Prezidanto de Rusia E-Unio,

## Likvido de Ukrainio ne bonvenas en Pollando.

Universitato Adam Mickiewicz nuligis la studrajton de la prezidanto de Rusia Esperanto-Unio pro liaj deklaroj subtenantaj la invadon de Rusujo kontraŭ Ukrainujo. La decido okazis post du leteroj al la universitato: unu sendita de la prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo, kaj dua de instruistoj, kunstudantoj kaj diplomitoj de la programo Interlingvistikaj Studoj.

*("Libera Folio". 11/04/2022)*